



Venontaj eventoj

👉 **Hodiaŭ** 👈

- ★ **11:00 atm:** skajp-renkontiĝo inter niaj mezniveluloj kaj tiuj ĉe SES en Slovakujo
- ★ **posttagmeze:** pro la KER-ekzamenoj, ne okazos posttagmezaj programoj ĝis ĵaŭdo
- ★ **7:30 ptm:** Jodi kaj Mel prezentos lum-bildojn pri sia lastatempo vojaĝo al Islando. Kunvenu en la salono de Cuzco n-ro 117.

Merkredo

- ★ **11:00 atm:** dua skajp-renkontiĝo, ĉi-foje kun la superaj klasanoj ĉe SES
- ★ **7:30 ptm:** Brandon prezentos pri Brazilo, Esperanto kaj spiritismo. Kunvenu en la komuna salono.

La NASKa Fasko


Redaktejo: Asante n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzempleron el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-letreirojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi:** viaj kontribuajoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpos vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (©) – kaj ili ridetante helpos vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

Trovi trezorojn estas tiel facile...




...kiel fali de sur ŝtono? Jen via hodiaŭa helpo por la daŭra konkurso de trezorserĉado (por la reguloj, vidu numeron 4 de la Fasko, pĝ. 2). Steĉjo kaj Meja foje kontribuos fotojn por helpi vin rekonigi kelkajn el la proksimaj trovindaĵoj. Jen tri el ili...

Pri la longeco de bananoj

de Katalin KOVÁTS


Banano estas la dua plej grava eksportprodukto de la malgranda sud-amerika ŝtato, Surinamo. Tiu eksporto iras al nur unu firmao de unu lando, kiu estus preta aĉeti eĉ la kvaroblon de la nuna kvanto, se eblus. Tutsimple, ĉar la kvalito de la bananoj estas tiel bona.

La kvalito estas bona, ja oni bone selektadas la fruktojn. Surinamo eksportas nur tiujn bananojn, kies longeco, freŝeco kaj bonaspekto respondas al la deziroj de la mendintoj. La resto servas por loka vendado.



La eksportado okazas en kartonaj skatoloj, kiuj povas enhavi difinitan kvanton da fruktoj de la dezirata longeco. La selektado de la ideale longaj bananoj okazas en la produkta centro de firmao Surland, kiun antaŭ nelonge vizitis grupo de biologoj. La direktoro komunikis al ili, ke la taksado de la longeco de bananoj plej ĝuste estis farata de virinoj, precipe de junaj virinoj, sekve nun tiu laboro estas konfidata nur al junuloj.

La konstato de la direktoro elvokis kelkajn malicajn konsiderojn ĉe la aŭskultantaj scienculoj.



Ĉu bananagramoj?

de Chris WINGROVE kaj Hoss FIROOZNIJA

Infektita per la bananomanio, Chris ekhavis la ideon enesperantigi la lastatempe furoran anglalingvan vortludon *Bananagrams*. Kvankam ni ne havas la tegoletojn de la originala ludo (nek la ĉarman bananeccan sakon), ni ja havas kartetojn kun literoj en la ĝusta ofteco-distribuo, do ili supezeble funkcios tute bone. Jen nia provizora regularo. Ĉu vi volus eble provludi kun ni iam ĉi-semajne?

1. Metu ĉiujn kartojn meze de la tablo kun la vizaĝoj de la kartoj malsupren. Tiu amaso nomiĝas la *fasko*. Se ludas nur 2–4 homoj, ĉiu prenu el la fasko po 15 kartojn. Se ludas 5–6 homoj, ĉiu prenu po 10 kartojn. Se ludas 7 (aŭ pli), ĉiu prenu po 8. Ankoraŭ ne renversu la kartojn! Iliaj vizaĝoj restu malsupren.
2. Unu ludanto diru “Ek!” kaj tiam ĉiu renversu siajn kartojn kaj komencu fari **siajn proprajn** interkonektitajn “vortojn”. (Vorto estu horizontalaj aŭ vertikalaj, kaj oni rajtas ŝanĝi ilin laŭdezire, sed ĉiuj vorto devas ligiĝi kun aliaj.) Ne estas vicordo: ĉiuj ludantoj konstruu vortojn samtempe.
3. Permesitaj “vortoj” estas radikoj, afiksoj, kaj memstaraj vortoj (ekz. “antaŭ”, “pli”, “preter”). Malpermesitaj estas kunmetaĵoj, vortoj kun gramatikaj finaĵoj, kaj propraj nomoj.
4. Kiam oni sukcesas uzi ĉiujn siajn literojn, tiu ludanto prenu unu novan karton el la fasko kaj diru “Prenu!” **Tiam ankaŭ ĉiuj aliaj ludantoj prenu po unu novan karton el la fasko**, aldonante ĝin al siaj kartoj.
5. Oni rajtas redoni al la fasko nedeziratajn kartojn, anoncante “Redono!” Tamen por ĉiu redonita karto, la redoninto **devas preni tri novajn kartojn**.
6. La ludo daŭros ĝis kiam restas malpli da kartoj en la fasko ol ludantoj en la ludo. Kiam oni uzas ĉiujn siajn kartojn, tiu krii “BANANOJ!” La aliaj ludantoj rajtas kontroli la kartojn de la krianto, uzante

Pliaj bananoj, el la estinteco



I.

LA BANANO=BUDO.

1. Karlo kaj Alfredo*).

Karlo estas knabo. Alfredo estas knabo. Fraŭlino Kramer estas la „banano-fraŭlino“.

Karlo kaj Alfredo: Bonan tagon, fraŭlino Kramer!

Fraŭlino Kramer: Bonan tagon, Karlo! Bonan tagon, Alfredo!

A.: Karlo, kio estas tio?

K.: Tio estas salato.

F. K.: Alfredo, kio estas tio?

A.: Tio estas banano.

Pro iu nekonata, mistera kialo (kiun, hipoteze, ni nomu “Katalin”) bananoj jam fariĝas la neoficiala temo de nia ĉi-jara kursaro. Rilate al tiu stranga fenomeno, Liĉjo lastatempe trovis, tute hazarde, la jenan bananaĵon – sur la unua paĝo de lernolibro el la frua 20-a jarcento. Eĉ tiam, ŝajne, esperantistoj multe okupiĝis pri bananoj...

(La libro estas *Esperanto Lernolibro por Popollernejoj* de Arthur DEGEN, 1930.)

preferatan vortaron. Se ĉiuj vortoj estas permesitaj, la krianto fariĝas la **gajninto de la rondo**. Tamen, se eĉ unu vorto estas malpermesita, la krianto fariĝas “putra banano”. La putra banano **ne plu rajtas ludi en la rondo**, kaj devas redoni ĉiujn siajn kartojn al la fasko. La aliaj ludantoj tiam daŭrigu la ludon.

Eventualaj variaĵoj:

- Kunmetitaj vortoj kaj finaĵoj estu permesitaj.

- Ĉiujn kartojn oni dividi inter la ludantoj dekomence, kaj la tuta ludo okazu sen prenoj aŭ redonoj. Gajnas la unua ludanto, kiu uzas ĉiujn siajn kartojn. Se neniuj povas uzi ĉiujn, gajnas tiu kun la malplej multaj neuzitaj kartoj.

Hajko

Sunplena NASKo?
La reklamo mensogis.
Mi frostas tage.

—Anonima